# LIGILO

n-ro 5 - decembro 1988

eldonkvanto: 9.000

redaktis: BEL-estraro


---

## F R O N T P A Ĝ E

Jen! Nia bulteno ŝanĝiĝis! Tamen, ĝia formo ne estas definitiva... Okazas, ke ĉe Ligo ni jam alkutimiĝis reagi laŭ la cirkonstancoj. Nu, ĝia celo daŭras la sama, kaj ni repetas al la esperantistaro favore respondi al niaj proponoj kaj aliĝinvitoj, ĉar de tio dependas kromaj numeroj kaj aliaj informiloj.


Bona novaĵo estas ke "Brazila Esperantisto" baldaŭ eldoniĝos helpe de financa apogo de S-ro Gilbert Ledon. Kompreneble, ne ĉiuj ricevos ĝin; nur la aliĝintaj membroj. Kaj, se paroli pri membreco, pere de la projekto proponinta de S-ro Sirio Silva — de li mem subvenciita — ni sukcesis 'kapti' la 88-an remembriĝon de multaj BEL-anoj. Ni konsideras pozitiva la ĝisnunan atingon, kaj la koncernaj ricevitaj kotizoj,i.a., ebligas la eldonadon de ĉi tiu numero de LIGILO.

La Perkoresponda kurso, laŭ informo de ĝia kompostisto, S-ro Gersi Alfredo Bays, estas jam tajpita kaj ĉemane de Prof. Geraldo Mattos por la unua revizio. Do, espereble ni ekvidos lumon el la tunelfino! Vere, la malfruo en la eldonado de la Perkoresponda kurso ege malhelpas nian laboron, ĉar granda nombro da homoj atendas ĝian pretigon por eklerni la lingvon. Krome — ni estas certaj — pere de ĝi la trajtoj de financa malekvilibro de BEL, kaj konsekvence de la tuta brazila movado, aliiĝos.

Fine, geamikoj, ekvojaĝonte al Kubo, de kie mi esperas alporti praktikajn rezultojn el la komuna diskutado kadre de 'Esperanto 88', mi vin ĉiujn salutas, esprimante kristnaskajn k jarfinajn bondezirojn.

Néia Lúcia

FELIĈAN KRISTNASKON!



FELIĈAN NOVAN JARON!

Ke la Stelo en nokta kristnaska ĉielo vin inspiru al amo
kaj prospero en ĉiuj viaj tagoj en la venonta jaro

## L I G - e r o j

Biénalo de S. Paulo/Librofoiro de Brasília - BEL prenis parton en ambaŭ libro-eventoj ĉe la stando de Librejo Thot, el Brasília, kun kiu ĝi interkonsentis por disvendado de E-libroj kaj por ĝenerala informado. La Prezidantino Néia Lúcia Souza vojaĝis al S. Paulo kaj persone oficis en la informado-servo, konsidere al la graveco de la Bienalo kiel elstara kultura okazaĵo. Kune kun BEL, Esperanto-Asocio de S. Paulo kaj Esperanto-Asocio de Belo Horizonte kontribuis por la kontentigaj rezultoj de tiu iniciato. En Brasília, okaze de la VII Librofoiro, la rezultoj de tia entrepreno ne estis malpli sukcesaj. Helpe de pluraj volontuloj el Esperanto-Asocio de Brasília, kiuj deĵoris en la daŭro de la evento, bone eĥis la propagandado de la lingvo.

Brazila Armeo publikigas en Esperanto - La Ministerio de la Armeo, laŭ propono de BEL, finpretigis esperantlingvan eldonon de la informilo "O Quartel-General do Exército Brasileiro", kiu estas disdonata en pluraj lingvoj al la vizitantoj de la Generalstabo-komplekso en Brasília. La publikigaĵo bele aspektas kun koloraj fotoj kaj resume trarigardas la historion, organizadon kaj nacian mision de l'Brazila Armeo. BEL dankas al S-roj Eloy kaj Danilo Carvalho Villela, el Rio de Janeiro, la helpon kun la traduko. Ekzempleroj estas haveblaj ĉe Centro de Comunicaçâo Social do Exército, QG Ex. - Bloco B (térreo) Setor Militar Urbano, 70630 Brasília-DF.

Internacia Konferenco en Kubo - Tre grava, serioza evento, vera premiero de la 75ª UK, estos okazanta en Havano - 30 nov/02 dec. Esperanto '88 — Internacia Konferenco por la Evoluo de Esperanto en Iberoameriko havas du ĉefajn celojn: malfermi al la E-publiko plian allogan aranĝon kun pluraj turismaj atrakcioj kaj pridiskuti la estontajn paŝojn de la Movado en Latinameriko surbaze de la Strategia Plano proponinta de UEA. Kiel evoluigi la E-Movadon en Kubo kaj Latinameriko; kiel antaŭenpuŝi efikan interŝanĝon de ideoj kaj spertoj; kiel movadi en agordo kaj kunlaborado; jen kelkaj el la malfacilaj demandoj debatotaj en la Konferenco. BEL tie estos reprezentata per sia Prezidantino Néia Lúcia Souza, kies restado en Havano estos parte subvenciata de UEA kaj Kuba Esperanto-Asocio. Entute, la okazaĵo promesas esti revigliga kaj fruktodona.

Tombŝtono por Ivo Lapenna - Simpatiantoj de tiu impona figuro en la historio de la E-Movado, forpasinta la 15-an de decembro 1987, lanĉis mondskalan monkolektadon cele havigi al "La Heroo de Montevideo" belan tombŝtonon je lia rememoro. Por pliaj informoj oni kontaktu S-ron Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK 2610, Rødovre, Danlando.

Amnestio alvokas - Memore de la kvardekjariĝo de la subskribado far Unuiĝintaj Nacioj de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, okazinta la 10-an de decembro 1948, Amnestio Internacia alvokas ankaŭ la esperantan publikon subskribi nomliston favore al efektiva respekto al la homaj rajtoj en la tuta mondo. La kolekton de ĉiuj subskriboj Amnestio Internacia solene transdonos al UN je la datrevena tago 10 dec 1988. La oktobra numero de la revuo Esperanto enhavas apartan prospekton kun la teksto de la Deklaracio kaj unu subskribolisto, kiun la interesitoj, post la kolektado, devos adresi al loka sidejo de AI aŭ al ĝia internacia sekretariato (Amnestio Internacia - Internacia Sekretariato, 1 Easton Street, London WC1X 8DJ, Britio).

Projekto bone plenumiĝas - La Projekto "Sirio Silva", lanĉita dum la BKE en Maceió, daŭre sekvas sian vojon. Tamen, oni povas antaŭdiri ke ĝiaj rezultoj estas pozitivaj, konsiderante ke el inter 531 membroj ne renovigintaj sian aliĝon al BEL 135 (25%) favore reagis kaj remembriĝis.

El Popola Ĉinio - La nova abonvarba kampanjo de la revuo El Popola Ĉinio komenciĝis la 1-an de oktobro 1988 kaj finiĝos je la 28-a de februaro 1989. Tiuj, kiuj abonos aŭ reabonos ĝin dum la abonvarba periodo ricevos kalendaron de 1989 en esperanto. El Popola Ĉinio estas abonebla ĉe BEL.

Radioamatoroj plue aktivas - Hispanlingva eldono de la revuo Radio Amateur - n-ro 51 marto 1988 - publikigis tre interesan, vere modelan artikolon pri Esperanto, titolitan "Esperanto kaj Radioamatoroj — resumem de mis conversaciones com un esperantista". La materialon subskribis Francisco J. Davila, kiu raportas pri sia plurdeka rilatado/kontaktado kun Ramón Rodriguez Peña, de kiu li ekaŭdis pri la lingvo. Krom la ĝeneralaj informoj pri Esperanto kaj ĝia kreskanta aplikado ĉe radioamatoroj, en bonega stilo por informado, la notico iras pli funden, diskonigante elementajn instruojn pri la lingvo, kun serio da plej ordinaraj paroloj dum kontaktiĝo, kaj publikigante mondtabelon de la disaŭdigoj en esperanto. Fakinteresitoj skribu al EASEX Francisco José Dávila Dorta, Apartado 39 (Poŝtkesto 39) 38080 La Laguna - Tenerifo - Kanariaj Insuloj, Hispanio.

"Economia Z" - Zamenhof Editores jam eldonis la du unuajn numerojn de la portugallingva bulteno Economia Z. La bulteno temas pri ekonomio, administrado kaj negocoj kaj utiligos Esperanton kiel laborlingvon, ĉar en ĝi aperos artikoloj originale verkitaj en la lingvo kaj aperintaj en la revuo Monato kaj en la bulteno Ekonomia Bulteno pri Usono.

Utinespo — Vojaĝanta Ekspozicio - Post plurjara aspiro, Asocio Esperantista de Rio de Janeiro (AERJ) prepariĝas por la Utinespo - Utileco Internacia de Esperanto, nome, okulfrape riĉa ekspozicio de libroj en esperanto, kies inaŭguracio, solena laŭ la programo, okazos la 12-an de marto 1989 ĉe la metro-stacio Carioca, Rio de Janeiro-RJ. AERJ informas ke la celo de la ekzpozicio estas montri al la ne-esperantista publiko ke Esperanto estas uzata en ĉiuj rondoj, kiuj bezonas interkomunikiĝi kaj kunlabori internacie, emfazante ĝian neŭtralecon politikan k religian, same kiel la strebadon de la E-komunumo por la monda paco surbaze de internacia amikeco. Oni antaŭvidas la okaziĝon de Utinespo ankaŭ en aliaj urboj, kaj pro tio la kromnomo "Vojaĝanta Ekspozicio". Por la sukceso de tiu iniciato kontribuos UEA, BEL kaj aliaj E-organizaĵoj.

Plia strato "Esperanto" - S-ro José Romão Filho, Komandoro de Rotario Internacia, anoncas ke li nomis "Esperanto" straton de la loĝkvartalo Cidade Comendador Romão, entrepreno lia situanta en la Municipo Padre Bernardo-GO. Tiu omaĝo atestas lian korinklinon al la Esperanto-Movado. La stratŝildon subvencios BEL (1,5 OTN).

Strategia Plano de UEA - Tre Serioza Afero - La projekto de strategia plano de UEA por la dua jarcento, publikigita en la oktobra ekzemplero de la revuo Esperanto, sobre analizas la nunan mondan staton de la E-Movado, proponante prioritatojn kaj novajn planojn de agado. Tiu strategio, kiun ĉiu serioza E-isto devas tralegi, bone resonas al la brazila esperantistaro, ĉar ĝi ja spegulas la bildon de la Afero en nia propra lando, konfirmante la demandojn starigitajn en la kadro de la 24-a BKE en Maceió. Tuŝante la malfortojn de nia nuntempa ĝenerala situacio, i.a. tiel atentigas la proponinta strategia plano: "Mankas taŭgaj integrigaj strukturoj en la Esperanto-movado, eĉ inter UEA kaj la landaj asocioj: la homoj emas iri sian propran vojon, sen integrigo kaj disciplino." Do, estus bone se entuziasmaj izolemuloj/unuopuloj, kiuj emas agi individuece, analizus funde tiujn konstatojn. La Strategia Plano de UEA estos pridiskutata en Kubo dum la Internacia Konferenco jam menciita en ĉi tiu LIGILO. Se vi havas proponon por la plibonigo de la Strategia Plano, aŭ kiamaniere BEL povas helpi por ĝia efektiviĝo, ne hezitu skribi al ni!

LBV kaj Esperanto - La periodaĵo "Jornal da LBV" aperigas ek de la septembra numero Esperanto-kurson gvidatan de Jorge das Neves, Ĉefdelegito de UEA en Brazilo, same kiel la informan kolumnon "A LBV e o Esperanto". Aliflanke, kreskas la intereso pri la dumonata E-versio de la sama gazeto.

75-a Universala Kongreso de Esperanto - Jen bonega ŝanco por la esperantistaro de Latinameriko por amasa partoprenado en UK! Je la unua fojo en Centrameriko, la 75-a UK en Havano, 14-21 julio 1990, certe estos unu el la plej sukcesaj en la historio de E-kongresoj. BEL jam havas ekzempleron de la Unua Bulteno, kiu prezentas tiun ĉarman, vizitindan insullandon kaj atentigas pri la graveco de nia aktiva partoprenado por la antaŭenigo de la E-Movado en Latinameriko.

Revuo Esperanto - En 1989 UEA aŭtomate ekspedos la januaran k februaran numerojn de "Esperanto" al la membroj-abonantoj de 1988. Por ricevi la martan k la postajn ekzemplerojn necesas renovigi la aliĝon al UEA. Do, se vi povos jam en decembro k januaro prizorgi vian membrecon, UEA antaŭdankas!

II Amazonia Renkonto de Esperanto - La evento okazos en Belém-PA de la 15ª ĝis la 18ª de decembro 1988. La amazonidoj pritraktos la temon "La praktiko de Esperanto en Amazonio". Pliajn informojn petu al Klubo Esperantista Zamenhof, CP-2012, 66.054 Belém-PA.

. A Diretoria da Liga Brasileira de Esperanto está procedendo a um levantamento no título "Contas Correntes" da contabilidade, a fim de eliminar pequenos saldos devedores/credores que se deterioraram pela inflação. Brevemente será comunicada aos correntistas a situação de débito ou crédito.

. Sempre efetue seu pagamento por cheque nominal em favor da Liga Brasileira de Esperanto.

. Considerando-se o alto custo da impressão de um catálogo completo, o Libroservo da Liga Brasileira de Esperanto, que já conta com mais de 400 títulos, tem distribuído periodicamente a lista "Laste aperis sur nia bretaro" a informar sobre as últimas aquisições. Continua, porém, sendo meta da atual diretoria a edição do catálogo.

LEI SARNEY E ESPERANTO

1. A Zamenhof Editores está em busca de investidores para a edição de livros em, sobre e para aprender Esperanto. O investimento será feito através da Lei Sarney, com participação no lucro da edição e dedução do investimento no Imposto de Renda. Os interessados devem escrever para Caixa Postal 1531 - CEP 74.000, Goiânia-GO (Fone: (062) 249-1217.

2. A Liga Brasileira de Esperanto já encaminhou os documentos exigidos pelo Ministério da Cultura, para que possa obter o cadastramento que a capacitará a receber subvenções via Lei Sarney.

PROMOÇÃO SUPER ESPECIAL

* Canetas Big Red, da Parker
Lindíssimas, em várias cores, gravadas com a palavra Esperanto
- com cordão.................................. 0,65 OTNs
- sem cordão.................................. 0,60 OTNs

* Adesivos para automóveis
Retangular, com a expressão Esperanto Língua Internacional......... Cz$ 500,00

* Adesivo para qualquer superfície - circular, fundo branco, balão em verde, com a estrela e a palavra Esperanto em verde.................................. Cz$ 500,00

Descontos especiais para grandes quantidades:
. a partir de 5 unidades (cada item)............... 15%
. a partir de 10 unidades.......................... 30%
. acima de 30 unidades............................. 40%

Obs. A oferta em cruzados dos adesivos vale até 31.01.89

## 25ª BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Mato Grosso do Sul --- diferenca, rava, emocia!

Venu al la 25ª Brazila Kongreso de Esperanto okazonta en la ĉefurbo Campo Grandé kaj kontribuu por la plibeligado de tiu mirinda pejzaĝo — memoru ke ni, esperantistoj, estas la sola popolo kiu povas pliriĉigi la 'pantanalan' faŭnon (kaj ankaŭ agi kiel protektantoj de l'ekosistemo) alportante niajn krokodilojn!!

Rimarkoj pri aliĝoj:

1. kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskurson, kursojn k.s.
2. kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono nek repagebla pro ajna kaŭzo.
3. ĉiu persono devas plenigi apartan aliĝilon.
4. valoro de la OTN por la kotizo estas tiu de la tago poŝte stampita sur la koverto.
5. por la kontrolo de LKK (Loka Kongresa Komitato) bonvolu kunsendi kopion de la kvitanco atestanta vian aliĝon por 1989 al BEL aŭ al BEJO.
6. pliajn informojn petu rekte al LKK aŭ al BEL

## A DIVULGAÇÃO DO ESPERANTO, AS BIBLIOTECAS E A PARTICIPAÇÃO DE TODOS NÓS!!

Com o objetivo de colocar livros didáticos e informativos sobre o Esperanto à disposição de maior número possível de pessoas, a Liga Brasileira de Esperanto criou o projeto "Esperanto nas Bibliotecas Brasileiras", que já contemplou as bibliotecas da Universidade de Brasília, do Instituto Nacional do Livro, em Brasília, e da Faculdade de Filosofia, Ciências e Letras Santa-Marcelina, de Muriaé-MG.

O projeto é simples: um pacote com 8 (oito) livros - gramáticas, dicionários e de informação - ao preço de 2,90 OTNs, mais 2 (dois) outros relativos à participação da Liga no projeto, é enviado ao(s) doador(es) juntamente com uma carta da Liga à biblioteca beneficiada, informando os objetivos do projeto e reconhecendo o(s) nome(s) do(s) doador(es). O pacote é composto dos seguintes títulos: Doutor Esperanto, Esperanto sem Mestre, Essência e Futuro da Idéia de uma Língua Internacional, Esperanto Língua Viva, Esperanto Básico, Dicionário Esperanto-Português, Homaranismo e Regras Gramaticais do Esperanto, no valor de 2,90 OTNs, incluídas as despesas de remessas, além de Zamenhof - o Iniciador do Esperanto e Dialogo, como oferta da Liga. Eventuais acréscimos de outros títulos no pacote ficam a critério do(s) doador(es).

Para a implementação do projeto, apresentamos algumas sugestões: a)contatar previamente a biblioteca que receberá os livros, informando-a sobre o objetivo do projeto (a divulgação do Esperanto nas bibliotecas brasileiras); b) promover alguma solenidade, ainda que bem simples, para a entrega dos livros, com a presença da comunidade esperantista local; c) a Liga fará um controle de todas as bibliotecas contempladas para evitar duplicidade; d) uma doação desse nível é notícia; portanto, elabore uma nota sobre o fato e a envie aos jornais e rádios da sua cidade -- caso seja publicada, remeta à Liga cópias dos recortes de jornal ou revista; e) as bibliotecas contempladas receberão posteriormente o LIGILO e outros informativos que a Liga eventualmente venha a editar, criando-se um vínculo informacional; f) ao remeter o pagamento à Liga, não esqueça de informar, naturalmente, o nome e o endereço da instituição a ser beneficiada.

## KAMPANJO POR LA PLINOMBRIGO DE LA FAKDELEGITOJ

Brazila esperantisto, fariĝu Fakdelegito de UEA kaj fortikigu la E-Movadon! Ni ĉiuj same valoras! Kandidatiĝu aŭ petu pliajn informojn al la Ĉefdelegito de UEA, S-ro Jorge das Neves (R. Barata Ribeiro, 727/107 - Copacabana, 22.051 Rio de Janeiro-RJ). Bv. kunsendi koverton kun poŝtmarkoj por la respondo. Skribu en esperanto, kompreneble!

LISTA DAS PUBLICAÇÕES QUE PODEM SER ASSINADAS JUNTO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO E QUE SOFRERAM REAJUSTES NOS PREÇOS - 1989

1. EL POPOLA ĈINIO — 1 ano - 1,12 OTN; 2 anos - 1,91 OTN; 3 anos - 2,78 OTN
   Mensal, 72 pg. Editada pela Liga Chinesa de Esperanto. Revista cultural e informativa, abrangendo também o movimento esperantista na China.
   (Sempre indicar se a assinatura é nova ou se é renovação)
2. ESPERANTO — 2,16 OTN
   Órgão oficial da Associação Mundial de Esperanto (UEA). Mensal, 24 pg.
3. FOKUSO — 2,00 OTN
   Trimestral, 64 pg. Editada pela Associação de Esperanto da Hungria, Revista científica-popular (substituiu, ampliando a área de abrangência, a revista "Internacia Komputado").
4. HEROLDO DE ESPERANTO — Via marítima 1,56 OTN; Via aérea 2,96 OTN
   16 números ao ano. Jornal independente, internacional e o mais popular no movimento esperantista mundial.
5. JUNA AMIKO — 1 assinatura 0,79 OTN; a partir de 3 assinaturas(cada) 0,71 OTN; a partir de 7 assinaturas(cada) 0,61 OTN; a partir de 28 assinaturas(cada) 0,52 OTN
   Bimestral, 24 pg. Para jovens e iniciantes. Artigos fáceis, peças teatrais, canções (com as notas musicais), anedotas, enigmas, etc. (Obs.: As revistas deverão ser enviadas para um só endereço).
6. KONTAKTO — 1,13 OTN
   6 números ao ano, 16 pg. Revista dinâmica e ilustrada, para jovens e iniciantes. Editada pela Organização Mundial de Jovens Esperantistas (TEJO).
7. LA JARO — 0,61 OTN
   Poŝkalendaro de la revuo "MONATO"
8. MONATO — 4,76 OTN
   Revista noticiosa mensal, 32 pg. Periódico internacional independente sobre política, economia e cultura.
9. PACO — 1,73 OTN
   Bimestral, 16 pg. Órgão oficial do MEM (Movimento Esperantista pela Paz Mundial)

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
Entidade de utilidade pública
Decreto nº 4.356 de 26 de outubro de 1921
CGC 00406504/0001-06
ICM 07 107.407-4
ISS 0747106

## 11-a BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO - BEJK

Okazos en Campina Grande-PB, de la 23-a ĝis la 28-a de januaro 1989, la 11-a Kongreso de Brazila Esperantista Junulara Organizo, kies temo estas "Kial kaj kiel junigi la Esperanto-Movadon?"

Aliĝoj: Kategorio 1 - BEJO-ano............................ 1 OTN
Kategorio 2 - BEL-ano.............................. 1 OTN
Kategorio 3 - nek BEJO-ano/nek BEL-ano............ 2 OTN

Rimarko: Sendante 3 aliĝojn laŭ kategorio 1 aŭ 2, vi pagos nur 2 OTN. La diskonto validas ĝis la 31-a de decembro 1988, Familianoj k infanoj rajtas kunpartopreni senpage. Aliĝilojn k pliajn informojn mendu al 11-a BEJK Cx. Postal 277 58.100 Campina Grande-PB

## DECIDOJ DE LA SUPERA KONSILANTARO

Nova elektado - Laŭ la statutoŝanĝoj aprobitaj de la Supera Konsilantaro okaze de la 24-a BEK, la mandato de la nuna estraro reduktiĝis de 4 al 3 jaroj. Tiel, jam en la venonta jaro, dum la 25-a BKE en Campo Grande-MS, elektiĝos nova BEL-estraro. Do, tiuj, kiuj volas kandidatiĝi kiel administranto de BEL sin preparu!

Modifo de membro-kategorioj - Kiel konstateblas kelkaj retuŝoj tiurilate, ni petas nian membraron legi atente la aliĝilon antaŭ ol ĝin plenigi.

Procentaĵo - Decidiĝis aldoni al la prezo de libroj kaj periodaĵoj procentaĵon por helpi la kovron de l'bankokostoj. La BEL-estraro difinis ĝin je 10%.

## NI FUNEBRAS

Pro la forpaso de esperantisto fervora, poeto, artisto, eks-estrarano de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, unu el la fundamentaj iloj por la kunfandiĝo de Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto, nia amiko D-ro Álvaro Fausto de Souza, la 3-an de aŭgusto 1988.

25-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 10-a ĝis la 14-a de Julio 1989

CAMPO GRANDE - MATO GROSSO DO SUL

ALIĜILO N-RO ____________

Mi aliĝas laŭ kategorio ____________.

Nomo ______________________________________________

Adreso ______________________________________________

Poŝtkodo ____________ Urbo ______________________ Ŝtato: ________

Tel.: ( ______ ) ______________ Naskiĝdato: ____/____/____ Sekso: ________

Dato: ______/______/______.

Subskribo: ______________________________________________

* Mi intencas loĝi en komuna loĝejo: ( ) jes ( ) ne

* Mi deziras partopreni en ekskursoj: ( ) jes ( ) ne

Por pagi mi sendas:

Ĉekon n-ro ____________ - Banko ______________________ - je la valoro de Cz$ ________

KOTIZTABELO

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Kat. 1 | - | BEL-ano | ........ | 1 OTN |
| Kat. 2 | - | BEJO-ano | ........ | 1 OTN |
| Kat. 3 | - | Ne ano de BEL aŭ de BEJO | ........ | 4 OTN |
| Kat. 4 | - | Akompananta familiano de BEL/BEJO-ano | ........ | 0,5 OTN |
| Kat. 5 | - | Akompananta familiano de ne ano | ........ | 2 OTN |
| Kat. 6 | - | Eksterlandanoj ne loĝantaj en Brazilo kaj infanoj ĝis 12 jaroj | ........ | senpage |

Por aliĝi al la 25-a BKE, plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin kun ĉeko je la nomo de la kasisto ATAIDE DINIZ DE GODOI, adresite al: 25-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO - CAIXA POSTAL 897 - CEP 79001 - CAMPO GRANDE - MATO GROSSO DO SUL

---

BOLETIM DE ADESÃO **1989**

Nome ______________________________________________

Endereço ______________________________________________

CEP ____________ Cidade ______________________

Estado ______________________ Telefone ( ____ ) ____________

Data de nascimento: ______ de ______________ de 19____

Profissão (ou especialidade): ______________________

Data: ____/____/____. Assinatura: ______________________

1. LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

ADESÃO

| | OTN | Cz$ |
|---|---|---|
| ☐ Sócio Contribuinte | 2,50 | |
| ☐ Familiar de Sócio | 1,50 | |
| ☐ Sócio Estudante | 1,00 | |
| ☐ Sócio Colaborador (a partir de | 4,00 | |
| ☐ Sócio Vitalício | 75,00 | |
| ☐ Donativo | - | |

2. ASSOCIAÇÃO MUNDIAL DE ESPERANTO (U.E.A.)

ADESÃO

| | OTN | Cz$ |
|---|---|---|
| ☐ MG - Membro Individual, recebendo apenas o MANUAL sobre o movimento esperantista | 0,55 | |
| ☐ MJ - Membro Individual, recebendo o ANUÁRIO (e revista KONTAKTO, se menor de 26 anos) | 1,34 | |
| ☐ MA - Membro Individual, recebendo o ANUÁRIO e a revista ESPERANTO (e a revista KONTAKTO, se menor de 26 anos) | 3,31 | |
| ☐ DM - Membro Vitalício, com os mesmos direitos de MA (e revista KONTAKTO, se menor de 26 anos) | 82,60 | |
| ☐ SZ - Sociedade Zamenhof: Categoria Mecenas (não inclui adesão à UEA) | 6,61 | |

SÓ ASSINATURA DE REVISTA

| | OTN | Cz$ |
|---|---|---|
| ☐ Revista ESPERANTO | 2,16 | |
| ☐ Revista KONTAKTO | 1,13 | |
| SUBTOTAL | | |
| DESPESAS DE REMESSA PARA O EXTERIOR (Associado da LIGA, quite 1989, está ISENTO) | + 10% | |
| TOTAL | | |

Remetente: LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
CAIXA POSTAL 11-1105
CEP 70084 - BRASÍLIA - DF (BRAZILO)

I M P R E S S O